

# ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN-1565 3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo  
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

## *KONGRESOJ, KONGRESOJ...*



La 19-a Kongreso de  
israelaj esperantistoj,  
3-5.05.2018 en Akko

En la 103-a Universala  
Kongreso de UEA  
28.07-4.08.2018 en  
Lisbono (Portugaliao)



Kongreso de italaj  
esperantistoj en  
San Marino

La redaktoro

Mikaelo Lineckij

La reviziantoj:

Gabi Zeevi

Eldad Salzman

Andreo Peçonkin

ELI-Prezidanto

Amri Wandel

La redakcia adreso:

[mikaelo@esperanto.org.il](mailto:mikaelo@esperanto.org.il)

La retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:

Mikaelo Lineckij

Abontarifo eksterlanda: 10 eŭroj.

Eblas pagi per UEA-konto elia-q  
aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

ISSN - 1565 3315



## Karaj legantoj,

Pro granda okupiteco de ELI-Prezidanto, ELI - estraro decidis proponi al mi okupiĝi pri redaktado de la revuo.

Mi havas kelkjaran sperton pri redaktado kaj eldono de "Helianto" - Informilo de Ukrainia E-asocio, tial mi tuj konsentis. Mi esperas, ke IE plu estos ne malpli enhaviĉa kaj interesa. Mi tre atendas vian subtenon - sendu la proponojn, interesajn informojn el via Esperanto-vivo!

La enhavo:

3. Sukcesa Kongreso en Akko.....A.Wandel
4. Vojaĝo tra Israelo.....A.Wandel
7. UK en Lisbono ..... J.Ŝelaĥ
9. La Kongresaj konkursoj ..... El oficialaj fontoj
10. UNESKO salutas..... A.Azoulay
11. En ombro de Wallenberg..... Je.Zajdman
17. La japana esperantisto... ..... Ja. Egozi
20. Itala E-Kongreso ..... A.Wandel
22. El aliaj landoj ..... M.Lineckij
23. Malstreĉiga paĝo .....M.Lineckij

## E-agado en 2018

### Sukcesa 19-a Kongreso de israelaj esperantistoj en Akko

**Amri Wandel**

Sabate la 5.05.2018 finiĝis la tri-taga Israela Kongreso en Akko. Partoprenis en ĝi pli ol 30 personoj. La programo estis sufiĉe riĉa. Oni ekskursis al Haifa (Bahaa Centro kaj japana muzeo Tikotin) kaj tra



Akko (ĉefe la kruckavaliraj fortikaĵoj).

Ĵaude kaj vendrede okazis distraj vesperoj kun koncertoj de Ĵomart kaj Nataŝa, de Edgar (Sepa), kaj lokaj kontribuoj de Enrika, Tali kaj Mikaelo.

La kleriga posttagmeza programo havis kontribuojn de Tali, Jehoŝua, Mikaelo, Gila kaj Luiza. La plenan programon kaj pliajn fotojn vi povas vidi

laŭ la adreso: <http://esperanto.org.il/ik.html>.

La partoprenantoj ricevis la novan numeron de Israela E-isto, kiu estas poŝte sendota al la ceteraj membroj kaj abonantoj. Poste komenciĝis la 7-taga postkongresa ekskurso al Jerusalemo, Morta Maro, Eilat kaj Jordanio.

Fotoj de A.Wandel

# Esperanto-vojaĝo tra Israelo kaj Jordanio post 19-a Israela Kongreso (Aperinta en revuo Esperanto, 2018:7)

*A.Wandel*

La internacie konataj muzikistoj Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj koncertis en la 19-a Israela Kongreso, partoprenis ankaŭ en la antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, entute pasiginte preskaŭ du semajnojn en Israelo kaj vizitinte ankaŭ la sudon de Jordanio. Inter la multaj turismaĵoj ili vizitis du famajn ZEO-jn: la E-tabulon en la preĝejo "Patro Nia", en Jerusalemo, kaj la mozikaĵon "Maria de la E-istoj", en la baziliko de la Anunco en Nazareto. En Jordanio ilia ĉiĉerono, Amri Wandel, renovigis la kontaktojn kun la arabaj gastigantoj en



Wadi Rum, kiuj dum simila pasintjara postkongresa ekskurso interesiĝis pri Esperanto. Mirinde ili eĉ memoris iomete Esperanton, kaj promesis plu lerni ĝin kaj akcepti la esperantistojn venontjare, post la komuna Israela kaj Mezorianta Kongreso en Eilat kaj Akaba.

Post la 19-a Israela Kongreso en Akko (vidu IE 164/165), okazis la tradicia post-kongresa ekskurso tra Israelo kaj Jordanio. Tiujn ekskursojn mi organizas kaj ĉiĉeronas ĉiujare, ĉefe por la eksterlandaj partoprenantoj en la Israela Kongreso. La tradicio komenciĝis post la Universala Kongreso en la jaro 2000 en Tel Avivo, en kiu mi interpretis en la 5-taga Postkongreso tra Jordanio.

Pasintjare partoprenis similan vojaĝon la nederlanda muzika duopo Ankie kaj Nanne, konataj kiel "Kajto", kiuj jam dufoje koncertis en la Israela Kongreso (en 2013 kaj 2017), kaj verŝajne koncertos ankaŭ venontjare, en la 20-a Israela Kongreso okazonta kune

kun la 12-a kunveno de MONA en Eilat kaj Akaba (<http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>).

Dum tiu pasintjara vizito ni aparte amikiĝis kun niaj beduenaj gastigantoj en la dezerta naturrezervejo Wadi Rum en suda Jor-

danio. Nia akompananto, juna bedueno nomata Suliman, eĉ volonte lernis kelkajn esprimojn en Esperanto. Kiam mi rezervis la ĉi-jaran viziton ĉe la sama familio, la ĉefo respondis, ke li memoras min kaj ĝojas pro la reveno.



Mi supozis, ke estas nur ĝentila respondo, sed efektive, kiam ni alvenis al Wadi Rum, atendis nin Suliman, kaj salutis nin en Esperanto. Li fiere montris al mi la folion kun la Esperanto-vortoj, kiun mi preparis por li en la antaŭa vizito pasintjare. Li lerte gvidis nin tra la mirinde belaj pejzaĝoj, foje tenante nian verdan standardon (vidu la foton).

Dum la antaŭkongresa ekskurso ni vizitis du famajn ZEO-jn en Israelo. Sur la Oliva Monto en Jerusalemo troviĝas la preĝejo "Patro Nia", kie la samnoma preĝo aperas sur muraj tabuloj en pli ol ducent lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto. Dum la jaroj la E-tabulo kadukiĝis, kaj por ĝin renovigi okazis internacia kampanjo. Per la kontribuoj kolektitaj de E-istoj tutmonde estis prilaborita nova tabulo, kiu estis inaŭgurita pasintjare. Vizitante la preĝejon kun la gastoj, mi kunportis la numeron de Israela E-isto, kun la raporto pri la nova tabulo kaj la ceremonio. Mi donacis la ekzempleron al la fratino Elisabeth (en la bildo), la ĉefmonaĥino kiu kunordigis la novan renovigon de la E-tabulo en 2017.

Ŝi bone memoris nin kaj tre ĝojis renkontiĝi kun ni.


En la baziliko de la Anun-ciacio en Nazareto trovi-ĝas korto kun dekoj da ikonoj de Maria, kon-tribuitaj de landoj el la tuta mondo. Ankaŭ la es-perantistoj donacis tabulon kun mozaikaĵo



kaj la skribajo "Nia Sinjorino de la Espero - Patronino de la E-istoj". Tamen, la landnomo sur metala ŝildo sub la tabulo havas eraron: ĝi diras "Esperantos". Ĉiujare, kiam mi vizitas la lokon kun la eksterlandaj esperantistoj okaze de la Israela Kongreso, mi atentigas la deĵorantojn pri la eraro, kaj ili promesas komuniki ĝin al la respondecaj personoj, sed ĝis nun - sensukcese. Eble la Patronino de la Esperantistoj ĉi-foje zorgos, ke oni forigu la superfluan literon ĉe ŝiaj piedoj...

## NI RIDETU

**Estas trovita kvara simio,  
kiu unuigas ecojn de la fama triopo:  
ĝi nenion vidas, nenion aŭdas kaj nenion diras...**



# MANIFESTACIO DE ESPERANTO EN LISBONO

Jaela Ŝelaĥ

---

## REMEMOROJ PRI LISBONO

Saluton, mi estas Jaela, mi partoprenis en la 103-a UK. Ĉi tiu estis la Universala Kongreso la unuan fojon okazinta en Portugalio.

La Kongreso okazis en Lisbono, la ĉefurbo de Portugalio.



Lisbono situas plej okcidente el eŭropaj ĉefurboj. Ĝi troviĝas en okcidenta Portugalio, ĉe la Atlantika oceanbordo, ĉe la buŝo de la rivero Taĵo, kaj kovras 84.6 kvadratajn kilometrojn. La urbaj limoj estas ene de la limoj de historia Lisbono. Ĉirkaŭ la urbo disvolviĝis kelkaj satelit-urboj, kiel ekzemple Odivelas, Amadora kaj Oeiras, formante la metropolan areon de Lisbono. La historia centro de la urbo estas konstruita sur sep montetoj krutaj tiel, ke kelkaj stratoj de la urbo permesas nur piediran trafikon. En la okcidento de la urbo estas Monsanto Park, la plej granda urba parko en la mondo. Du pontoj, kiuj ligas partojn de la urbo, super la rivero Taĵo: Ponto de 25-a de Aprilo (memorifestante la Revolucion de la Diantoj), konstruita en 1966, kaj ponto Vasco da Gama. Ĉi tiu lasta estas 17.2 kilometrojn longa kaj estas la plej longa en Eŭropo kaj la naŭa el la plej longaj en la mondo.

La Kongresa temo en Lisbono:

### **"Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?"**

Estis bonege renkonti denove karajn geamikojn, kiujn mi renkontis en la antaŭaj Kongresoj. Mi renkontis ankaŭ novajn geamikojn kaj denove ĝuis kune la Universalan Esperanto-Kongreson. En la Kongreso mi partoprenis en kelkaj ekskursoj, mi vere ŝatas ekskursi... Mi ĉeestis ankaŭ la vespermanĝon kun fado-spektaklo. Fado estas portugala muzika stilo. La kantistojn de fado akompanas du gitaroj: klasika gitaro kaj portugala gitaro kun 12 kordoj.

---

La kantoj estas romantikaj kaj en ili temas pri la lunatiko, kvankam iuj el la fado-kantoj estas gajaj. Iuj asertas, ke fado fontas el la 15-a jarcento, kiam virinoj funebris siajn edzojn, kiuj navigis al nekonataj oceanoj. Estas ankaŭ tiuj, kiuj asertas, ke fado havas moralan influon, precipe per muzikaj instrumentoj. La instruistoj forlasis Portugalion en la 13-a jarcento, sed ilia influo pri arto kaj muziko estas klara. La vorto fado venas de la latina - ĝia signifo estas “destino”.

En 2011, UNESKO rekonis fadon kantantan kiel intangeblan kulture heredaĵon. En la salonoj de fado-domoj, la tradicia fado sonas precipe por turistoj.

La nuntempa fado kombinas la akompanion de pli ol du gitaroj eĉ ĝis la orkestro.

Ĉi tio okazis en mia jam 14-a Internacia Kongreso... Ni revidu nin venontjare, en la Kongreso okazonta en Lahti, Finnlando!

## ESPERANTO - AMIKECO SEN LIMOJ!






## LA KONGRESAJ KONKURSOJ

*El oficialaj fontoj*

En la Belartaj Konkursoj nia samideanino **Luiza Carol** gajnis la unuan lokon por la “Infanlibro de la Jaro”, pro



*Tikiriki Tok el  
Strobilo*

(kune kun alia libro)



En la branĉo “Eseo”:  
Honora mencio al **Amri Wandel** el Israelo,  
pro "**La homo kiu komprenis la universan lingvon**"

En la konkurso pri la plej bonaj sciencaj verkoj **Amri Wandel** gajnis la unuan premion en tri branĉoj kaj la trian en la kvara:

- Branĉo **libroj**:
- (1) Amri Wandel, “La Kosmo kaj Ni”, 3-a eldono (FEL 2017)
- (2) Amri Wandel (red.), Internacia Kongresa Universitato, 70-a sesio (UEA 2017)
- Branĉo **artikoloj**:
- (3) Amri Wandel: “Nova horizonto trans Plutono” (“Ondo de Esperanto” 2018)
- Branĉo **kursoj**:
- (1) Amri Wandel: “Enkonduko al Astronomio” (reta, Univ. de Esperanto)
- Branĉo **prelegoj**:
- (1) Amri Wandel: “Nigraj Truoj” (Kataluna Kongreso 2017)

**NIAJN SINCERAJN GRATULOJN  
AL LA GAJNINTOJ!!!**



## Mesaĝo de s-ino Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, Lisbono, la 29-an de julio 2018

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio.

Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruĉiĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu distara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interklingojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivado inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiaj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

La lingvoj, kiuj estas la vektoro ebliganta tiun dialogon, konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn

ni devas realigi, kaj same por la defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias, ke ili malaperas nuntempe laŭ la ritmo de po unu ĉiujn du semajnojn – kio estas neriparebla perdo por la homa heredaĵo. Ni devas defendi ankaŭ la plurlingvismon en la instruado, per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la interreto, por ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco de ĉiuj homgrupoj; por ke ĉiu povu lerni pri sia historio, sia identeco, ĉerpante el la simbolaj fontoj de sia origina etno.

Tiu sin-engaĝo estas ankaŭ la via. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male, ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto, kaj realigas la ekziston de homgrupo de parolantoj, sendependaj de ia ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas sin levi al kosmopolita konscinivelo, esti mondi-

vitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn.

La temo elektita por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de multaj jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn; defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado.

Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan. “Multaj voĉoj, unu mondo” – jen la slogano de nia fame konata organo *Unesko-Kuriero*.

“Multaj voĉoj, unu mondo”, tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas – kaj kiu estas skribita sur la versio de nia revuo, aperanta ekde nelonge en Esperanto: *Unesko-Kuriero*.

Finfine mi volas esprimi, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn por la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay,  
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj

Ako viete, UNESKO podporuje vycovnanieesperanta uzmnoborokov

Zoals u weet, ondersteunt UNESKO het onderwys in Esperanto al vele jaren

Som ni vet nar UNESKO stött undervisning i esperanto under åtskilliga år

正如 你 所 知， 联 合 国 教 科 文 组 织 支 持 世 界 语 教 育 好 多 年 了

As you know, UNESKO has supported the teaching of Esperanto for many years

Как вы знаете, ЮНЕСКО поддерживает обучение эсперанто в течение многих лет

Comme vous le savez, l'UNESKO soutient l'enseignement de l'espéranto depuis de nombreuses années

Como sabem, a UNESCO apoia o ensino do Esperanto há vários anos

Bildi ĝimiz gibi Unesco uzun yıllardan beri Esperanto eğitimini desteklemektedir

## EN OMBRO DE WALLENBERG

Jefim Zajdman\*

(el la rusa tradukis M.Lineckij)

Budapeŝto en 1944-45 jaroj. Malvenko de Germanio neeviteblas – la hungaraj kaj germanaj faŝistoj fariĝas pli kaj pli senkompataj rilate al la malamikoj de la Regno, strebante ekstermi kiel eble multajn kontraŭfaŝistojn, ideajn kontraŭulojn kaj enpeltutan judan loĝantaron en geton por “definitiva solvo” de la juda problemo. Tiucele en Budapeŝton el Berlino venis la ĉeffakulo Adolf Eichmann (en la 1960 li estis kaptita fare de “Mossad” (מוסד) en Argentino kaj kaŝe translokita por la juĝproceso en Israelon. ndlt - noto de la tradukinto). En atmosfero de ĥaoso Sveda Ruĝa Kruco kaj poste ĉefo de humanitara sekcio de la Sveda ambasadejo Raul Wallenberg savas de la pereoj kelkajn dekmilojn da homoj, donante al ili protektajn dokumentojn. Eĉ post tio, kiam la estro de Sveda Ruĝa Kruco Valdemar Langlet kaj lia edzino Nina Langlet eksciis, ke ili estas kondamnitaj je mortpuno de la germanoj, ili plu gvidas savadon de la homoj, konspire kaŝante sin .



NINA KAJ VALDEMAR  
LANGLET

Budapeŝto en tiu periodo estas kvazaŭ maskerado de morto, en kiu multaj maskis sin por savi la vivon. Unu el ili, Teodoro Schwarz [SOROS Tivadar] , patro de nuna fama financisto kaj filantropo Georgo Soros, kaŝis sin sub la masko de nobelo kaj kristano kaj helpis al multaj savi sin.

Post la veno en Budapeŝton de Sovetia Armeo la militskola organizaĵo “SMERŜ” (“Morton al spionoj” - ndlt) ŝtelas Raulon Wallenberg, kaj li pereas en torturejo de Lubjanko (tiam soveta ŝtatestrejo) fariĝinte heroo. Valdemar kaj Nina Langlet dum longaj jaroj restis en “ombro de Wallenberg”.

Antaŭ nelonge traduke el la sveda al Esperanto aperis libro de Nina Langlet “Ĥaoso en Budapeŝto”, kaj esperantistoj de Jalto (urbo en Krimeo), komprenis, ke Nina estas filino de unu el pioniroj de Esperanto Nikolao Borovko, aktiva socia aganto en Krimeo

komence de la XX-a jarcento kaj de Antonina Ĉajkovskaja. Infaneco kaj juneco de Nina pasis en Ukrainio kaj Rusio, kie formiĝis fortaj karakteroj, humanismo, kiuj estis integra parto por fariĝi heroo-kontraŭfaŝisto.

Evidentiĝis, ke Valdemar Langlet kaj Teodor Schwarz estis ankaŭ esperantistoj. En tiuj malproksimaj jaroj ilin ĉiujn unuigis kaj edukis kiel humanistoj idea flanko de esperantismo, ĝis t.n. “interna ideo”: uzo de Esperanto, neŭtrala internacia rime- do por la komunikado, por unuigi homaron en unu familion de frataj popoloj. Tiam la ideon atentis diversaj pacifismaj kaj religiaj movadoj kaj poste ankaŭ politikaj, penetro de kiuj forti- migis multajn de E-movado. Rezulte ĝi penis resti flanke de ak- tiva internacia vivo, evoluigante nur la lingvon.

Nun okazas financa, komerca kaj industria unuigo de la mondo en la planeda skalo, bezonata por ĝia plua vivo, sed ne por proksimigo de la popoloj. Plimulto de la homoj ne estas pre- taj por tio, eĉ male: oni revas pri plifortigo de siaj etnoj, religioj, lingvoj. Unuigantaj la homojn moralaj kaj spiritaĵaj valoroj mal- fortiĝas, anstataŭ fortiĝi, kaj tio direktas al krizo.

En tiu situacio idea flanko de esperantismo fariĝas pli kaj pli al- loga. Ĉi tiu movado povas multe kontribui al popolamikeco kaj ties unuigo, des pli, ke Eŭropo nun fariĝas nova Babelo.

### **Mortodanco kaj ĥaoso en Budapeŝto**

Komence de 1944 malvenko de germanoj en Balkanio kaj necerteco pri lojaleco de Hungario koincidis kun revo de Hitler ekstermi preskaŭ milionon da hungaraj judoj, kiujn registaro de Horthy ne tuŝis. La germanoj eniris Hungarion la 19 de marto 1944, kaj helpe de hungaraj faŝistoj komenciĝis amasaj razioj kontraŭ judoj kaj kontraŭfaŝistoj, forsendante ilin al “laborkoncentrejoj”. La 11-monatan periodon ekde komenco de germana okupado de Hungario ĝis veno de sovetia armeo febru- are de 1945 en Budapeŝton eblas dividi je 3 periodojn.

Adolf Eichman venis marte-1944 per la unua trajno kaj ko- mencis efektiviĝi t.n. “definitivan solvon” de la juda problemo. En periodo inter fino de aprilo ĝis komenco de julio preskaŭ duonmiliono da judoj (fakte preskaŭ la tuta juda loĝantaro eks-

ter Budapeŝto) estis deportita por la ekstermo. En Budapeŝto oni ne tuj enpelis judojn en geton, sed preparis ilin por la deportado, markinte iliajn domojn per flavaj steloj. Fine de junio, kiam informo pri amasaj deportadoj atingis Okcidenton, komenciĝis energiaj protestoj de socia aktivularo de okcidentaj kaj neŭtralaj landoj, reĝo de Svedio, Romia Papo kaj Internacia Ruĝa Kruco. La 8-an de julio la admiralo Horthy precipe sukcesis halti la planitajn deportadojn, kvankam Eichman sukcesis forveturigi du trajnojn, trompinte la hungarojn. Sed ĉi foje devis interveni mem Himm-ler, kaj Eichman finfine estis devigita forlasi Budapeŝton. Tiu dua periodo daŭris ĝis mezo de oktobro. Sed post tio kiam Horthy rompis la unian kontrakton kun Germanio, la germanoj okupaciis Hungarion kaj establis tie faŝisman reĝimon. Eichman revenis, kaj en Budapeŝto komenciĝis ĥaosa mortiga orgio: amasaj deportadoj, surstrataj diboĉoj de sago-kruculoj (hungaraj faŝistoj). Laboro por savi la homojn estis ekstreme danĝera.

Kiam en aprilo de 1944 Valdemar Langlet eksciis de malliberulo de la koncentrejo Auschwitz (Oświęcim), kiu mirakle sukcesis fuĝi de tie, ke “laborkoncentrejoj” estas lokoj por amasa ekstermado, li estis frapimpresita kaj ekspedis la informon al Ministerio por Eksteraj Aferoj de Svedio. Langlet komencis pensi, kiel eblas kontraŭagi al tiu infera eksterm-maŝino de Adolf Eichman. Hungaroj estas leĝoobeemaj civitanoj, kaj Langlet komprenis, kiel tion eblas uzi: se oni donos al la homoj dokumenton pri tio, ke ili estas defendataj far Ruĝa Kruco de neŭtrala lando, eble en tiu ĥaosa atmosfero tio efikos. La ideo estis aprobita kaj por ĝia efektivigo estis proponita al Langlet fariĝi estro de sveda Ruĝa Kruco.. Li estis jam 72-jara, sed li komencis efektiviĝi la ideon.

Maje komenciĝis disdono de la “defend-paperoj” de la sveda Ruĝa Kruco, kiuj estis similaj al svedaj pasportoj kun proksimume la samaj datumoj, sed estis trilingva frazo (en la sveda, hungara kaj germana), ke posedanto de la dokumento estas sub patronado de sveda Ruĝa Kruco. Ĉi tiujn dokumentojn oni nomis “pasporto de Langlet” kaj estis donitaj al homoj, kiuj kvazaŭ havas parencojn aŭ komerc-partnerojn en Svedio. Baldaŭ, krom privatuloj, ankaŭ multaj hospitaloj, monaĥejoj, muzeoj petis la patronadon de sveda Ruĝa Kruco.

Rezulte estis patronitaj 9 katolikaj monaĥejoj, evangeliaj societoj, 12 hospitaloj, 14 maljunulejoj, 5 sociaj manĝejoj, 47 infanĝardenoj kaj en la internacia geto 8 domoj por 3000 homoj, kiuj ricevis la dokumentojn. Kiel rifuĝejoj estis monaĥejoj kaj privataj loĝejoj ankaŭ tiu de geedzoj Langlet.

Julie en Budapeŝton por gvidi la humanisman fakon de la reprezentejo venis Raul Wallenberg, kiu komencis laboron pri donado de svedaj patronaj pasportoj. Li havis permeson de hungara estraro por disdoni 4500 pasportojn, sed fakte estis donitaj dekoj da miloj. En la internacia geto estis 33 domoj por lokigi homojn, kiuj ricevis la pasportojn.


Langlet vidis, ke malgraŭ agado por savi la homojn, la masakro daŭras plu enorme. Sveda Ruĝa Kruco disdonis ĉirkaŭ 25 milojn da patron-dokumentoj, sed tio estis nesufiĉa. Langlet proponis al tri episkopoj de diversaj konfesioj viziti estron de la registaro kaj postuli ĉeson de la ekscesoj de la nazioj, sed tiuj provoj estis senrezultaj. En tiu tempo, kiam sovetia armeo estis sukcese atakanta sur hungara teritorio, en Budapeŝto regis ĥaoso. En unu el monaĥejoj, kiu estis patronita de sveda Ruĝa Kruco kaŝiĝis 120 kristanaj judoj, en ĉiu kelo estis po 13 homoj (la monaĥoj mem noktumis en la koridoroj) kaj en la internulejo estis kaŝataj infanoj. Ĉiuj, kiuj kaŝis sin tie kune kun la monaĥoj, estis arestitaj, sed, dank'al bombekspolodo de la ejo ili sukcesis fuĝi. Valdemar kaj Nina gvidis savadon de la homoj kaŝante sin en la rifuĝejoj, ĉar ili sciis pri la mortkondamno. Diference de R. Wallenberg, ili ne havis diplomatan imunecon. Unu el la kunlaborantoj estis arestita, kaj per torturoj oni volis, ke li donu informon, ke la geedzoj Langlet estis rusiaj spionoj. Alia kunlaborantino estis torturita por ke ŝi malkovru, kie ili kaŝas sin.

Pri savado de la homoj, kvankam ne tiomkvante, okupiĝis ankaŭ reprezentantoj de Vatikano, Hispanio, Argentino, ankaŭ privatuloj. Unu el ili estis budapeŝta advokato Teodor Schwarz, kiu por resti vivanta, en 1939 ŝanĝis familinomon al Soros, kaj post veno de la germanoj vivis helpe de falsaj dokumentoj, kiel nobelo kaj kristano, kaj samtempe, riske por sia vivo, helpis eskapi la morton al aliaj homoj.

En 1965 T.Soros publikigis en Esperanto libron “Maskerado ĉirkaŭ la morto” pri situacio en okupita de nazioj Budapeŝto. La libro estis tradukita en la anglan kaj en la rusan. Estinte sperta advokato, li pripensadis kaj



G. Soros



mendis ĉe la fakuloj falsajn dokumentojn por parencoj, amikoj kaj por ĉiuj, pri kiuj petis liaj amikoj.

Ankaŭ en paca periodo lia vivprincipo estis laŭebla helpo al ĉiuj, sed li ĉiam estis en reala nivelo. Jen kiel li klarigis sian vivprincipon al la filoj Paul kaj Georgo: “Ni devas helpi al homoj tiukaze, se rezulto de la helpo superas elspezitan en-

erģion. Ne avaru pri oferdonoj, se de ĝi estos pli da utilo ol ni perdas.” Tio estas principo de “energetika imperativo” de laŭreato de Nobelpremio pri fizika kemio Wilhelm Ostwald aplikata al homaj interrilatoj: “Konduitu tiel, ke origina energio transformiĝu al pli alta formo de energio kun minimumaj perdoj”. Por realigi tiun vivprincipon, necesas esti relative materiale sendependa. Por tio de riĉaj klientoj T.Soros postulis altajn honorariojn pro la donitaj komplezoj kaj de malriĉuloj li tute ne prenis monon, kontentigante tiumaniere sian inklinon al filantropio.

Januare 1945 armeo de generalo Malinovskij liberigis distrikton Pest de Budapeŝto. Kontraŭskolta organizaĵo “Smerŝ” ricevis ordonon el Moskvo trovi kaj gardi kelkajn homojn de sveda reprezentejo, nome R.Wallenberg kaj Valdemar Langlet kun la edzino. Ejo de Ruĝa Kruco kaj persone geedzoj Langlet estis gardataj, sed la sekretario de la Ambassadejo R.Wallenberg malaperis, kaj kiel nun estas konate, li estis forveturigita al USSR kaj tie murdita. Valdemar kaj Nina sukcesis savi sin kaj reveni al Svedio. En 1946 estis eldonita libro de V.Langlet pri agado de Sveda Ruĝa Kruco en Budapeŝto kaj en 1982 – libro de N.Langlet “Ĥaoso en Budapeŝto”. En 1966 Israelo ili estis anoncigitaj “**Justuloj inter la popoloj**” (hebree: ( הַסִּידִי אֲוֻמוֹת הָעוֹלָם ) same kiel multaj homoj, kiuj estis savantaj judojn dum la milito riske por la vivo. Ĝenerale en Hungario “Justuloj inter la popoloj” fariĝis ĉirkaŭ 475 hungaroj kaj en la mondo – ĉirkaŭ 11000 homoj.

Pasis multaj jaroj. Valdemar mortis en 1960, Nina – en 1988, kaj jen antaŭ nelonge en Svedio aperis libro “Valdemar Langlet – ĉu forgesita heroo?” far esperantistino Agneta Emanuelson kaj en Esperanto-gazetaro artikoloj pri tiu temo kaj libro de Nina tradukita en Esperanton. Rezulte kontraŭfaŝisma agado de sveda Ruĝa Kruco estis denove digne aprezita: Valdemar kaj Nina Langlet postmorte estis promociitaj al Honora Civitaneco en Israelo. Tiu titolo povas esti donita nur al “Justuloj inter la popoloj” kiel honoro, kaj ne estas ligita al reala civitaneco. Fakte tio signifas “honoran eternigon de la memoro”.

\* La artikolo estas verkita de fama sovetia esperantisto el Krimeo **Jefim Zajdman** (1937 - 2017). Li estis pioniro de la postmilita restaŭro de E-Movado en Sovetio, lerninte Esperanton en 1956. Li ĉiam estis aktiva organizanto kaj partoprenanto de E-aranĝoj. Je.Zajdman fondis jaltan E-klubon “TERO” kaj estis ĝia senŝanĝa gvidanto. Li verkis kaj tradukis multegajn kantojn, li esperantigis eĉ rok-operon de A.L.Webber “Jesuo Kristo - superstelo”. Li aktivis ĝis la lasta tago de sia vivo, kiu abrupte finiĝis tragike en la trafik-akcidento ĝuste antaŭ unu jaro.



## SENTENCO

Iun saĝulon oni foje demandis - kio pleje mirigas lin? Li respondis – homo... Komence li oferas sian sanon por perlabori monon. Poste li elspezas tiun monon por restaŭro de la sano. Dume li tiom multe estas zorginta pri sia estonto, ke neniam ĝuas la nunon. Rezulte li vivas nek en pasinto, nek en estonto. Li vivas tiel, kavazaŭ mortos neniam... Kaj mortante li bedaŭre konstatas, ke fakte li eĉ ne vivis.

Mi volus memori al ĉiuj, ke vivo forlasas nin tiel rapide, kvazaŭ por ĝi estas ne interese esti kun ni... Kion do fari? Memoru, ke en jaro estas nur du tagoj, en kiuj ni povas fari nenion – unu el ili nomiĝas hieraŭ kaj la dua – morgaŭ.

Geomikoj, vivu hodiaŭ, ĉar “hieraŭ” estas jam for kaj al “morgaŭ” vi simple povos ne trafi. Sciu, ke hodiaŭa tago estas la plej bona tago en via vivo por fari ion utilan, por fari ion gravan - por ellerni ami, por kredi kaj simple vivi.. .



## La japana esperantisto kiu enamiĝis en la hebrean

*Yoela Egozi*

---

Kiam mi finis la kurson, mi skribis al la Koresponda Servo Mondskala en Francio, kaj petis adresojn de samideianoj – korespond-geamikoj. Surprise, mi ricevis leterojn el la tuta mondo, de homoj en ĉiuj aĝoj, multaj el ili estas multjaraj esperantistoj. (vere diri, tio komplimentis al mi). Ĉiam en miaj unuaj leteroj mi demandis ilin la jenajn demandojn: "Mi ŝatus scii, kial kaj kiam vi decidis lerni Esperanton? Kion aldonis al vi tiu internacia lingvo? Kiuj estas la agadoj en via esperanta klubo?" La respondoj estis diversaj, interesaj, kaj parto de ili emociigis min. Pri ili mi ne rakontas ĉi-foje.

La rakonto hodiaŭ estas pri japana esperantisto, kiu enamiĝis en hebrean lingvon. [דווקא בעברית – אבל לא משתמשים בזה כך בשפות אחרות]

Li sukcesis surprizi kaj emociigi min per la hebrea vorto "aere" sur la koverto, kie li uzis la hebrean daton, kaj kun la hebrea frazo pri sia profesio tuj en la unua letero. Ĉiam denove en siaj leteroj li sukcesis surprizi kaj emociigi min per la hebreaj vortoj kaj kun la hebreaj frazoj, kiujn li uzis. Superfluas menciĝi, ke la leteroj estas subskribitaj hebree.

Kompreneble, mi estis scivola pri lia scio de hebrea lingvo. Post la respondo mi pensis, ke la afero estus rakontinda en nia klubo. Do mi skribis al li: "Via vivrakonto pri la vojo, kiu kaŭzis al vi interesiĝi pri la hebrea, impresis min. Permesu al mi citi kaj uzi tiun rakonton (eĉ inkognite) por emfazi la gravecon de E-o por kontaktiĝi kun fremduloj. Sen Esperanto mi neniam povus esti via korespond-amikino, kaj lerni pri la pasio de fremduloj admiru kaj eĉ peni lerni malfacilan lingvon, kaj kompreneble diskuti pri la hebrea".

Jen estas la rakonto:

Li ĉiam ŝatis klasikan muzikon. Unu tagon en la aĝo 14 li aŭdis hejme per la radio verkon de Vivaldi "La kvar sezonoj", kiu ege plaĉis al li. Li rapidis al la butikoj por aĉeti ĝin.

Kiam li revenis hejmen kaj aŭdis la muzikon, li estis senrevigita – tiu ne estis la sama ŝatata verko. Do li revenis al la butikoj, kie la vendisto proponis al li aŭskulti ĉiujn versiojn, kiuj ekzistis en la butikoj. Finfine troviĝis la dezirata. La nomo de la dirigento estis Leonard Bernstein. De tiam li aĉetis ĉiun verkon, kiun Bernstein verkis aŭ dirigentis. Interalie, la verkoj estis "Jirmija"

kaj "Kadiŝ". Tie li sciiĝis, la unuan fojon, pri iu nekonata lingvo. Kiel scivolemulo, li serĉis informojn pri la stranga lingvo, pri kies ekzisto li neniam sciis, kaj certe ne sciis pri la ligoj inter la hebrea, la judoj, kaj la israelanoj. Por kompreni la tekstojn li ek-lernis la hebrean. Ni, israelanoj, estas konsciaj pri nia malfacilega lingvo. Imagu la problemojn de fremda lernanto, japano, kiu mem lernas. Li demandis min multe pri gramatikaj reguloj, pri punktado, pri akcento ĉe la lasta silabo aŭ la antaŭlasta, kaj pri uzado de vortoj kaj esprimoj.

Mi klopodis laŭeble respondi, kaj foje mi devis skribi tiel: "Mi ne ignoris la demandojn, simple mi ne sciis klarigi la plimulton de ili. Mi ne estas lingvistino, sed estas temoj, kiuj estas memkopreneblaj al mi, ĉar la hebrea estas mia gepatra lingvo". Aldone mi rekomendis al li du vortarojn: 1) Plena vortaro Esperanta-Hebrea, 2) Praktika vortaro Hebrea-Esperanta. En la venonta letero li elkore dankis min, ĉar li tuj mendis tiujn de UEA, kaj skribis, ke ambaŭ estas tre utilaj por li.


La jenaj ekzemploj demonstras lian fortan volon. En 2009 mi gratulis lin kaj lian landon okaze de la gajno, unuafoje, de japana verkisto Haruki Morakami de la prestiĝa literatura premio "Jerusalema Premio" en la libro-foiro. Mi esperantigis el la gazeto la argumentojn de la ĵurikomsiono, kial ili preferis Haruki Morakami, kaj mi aldonis unu artikolon skribitan pri tiu decido. En la responda letero li sendis la saman artikolon presitan sur la folio: - sur la dekstra flanko – hebree, sur la maldekstra – en esperanto. Temas pri longa komplika artikolo.

Li volis scii mian opinion pri la traduko kaj aliajn klarigojn pri hebreaj esprimoj. Tiam, fine, li aldonis liston kun 10 demandoj.

Alian fojon lin mirigis la beno de la pastroj en la muzikaĵoj de Leonard Bernstein, esperantigis ĝin, kaj skibis: "Ĉi tiuj estas kantataj de baritonulo, mallaŭte, majeste kaj sanktece. Kiel bela estas la melodio!"

Ĉiujare mi ricevas de li novjaran dezirkarton. La bondeziroj estis skribitaj kaj en Esperanto kaj en la hebrea, kompreneble. Nun, la konkludo: Esperanto malfermas aperturon al la vasta mondo de scio, de travivaĵoj kaj de amikeco, kiu ne estus ebla sen la komuna lingvo, kiu ebligas egalrajtan dialogon inter la homoj de la tuta mondo.

## KIOM? PROVU SOLVI...



Por sukcese solvi la taskon, necesas ne nur scipovi aritmetikon, sed esti ekstreme atenta. La solvo estos priskribita en IE N<sup>o</sup> 167.

# KONGRESO DE ITALAJ ESPERANTISTOJ EN SAN MARINO

*Amri Wandel*

Eble la plej granda nacia Esperanto-kongreso estas la Itala. Ĝi ankaŭ estas tre populara inter eksterlandanoj, ankaŭ israelanoj. Tamen, ĉi jare Israelo havis nur unu reprezentanton en la 85-a Itala Kongreso, okazinta fine de aŭgusto en San Marino, kiu fakte ne estas Italio sed memstara eta respubliko apud Rimini.



La kongreso okazis en la impona kongresa centro de San Marino. La kongresanoj tranoktis en diversaj hoteloj, kie ili maten-kaj vespermanĝis, sed tagmanĝon eblis manĝi kune en la kongresejo. La programo estis strukture simila al tiu de la Universala Kongreso: sabate interkona vespero, dimanĉe inaŭguro, anstataŭ la Internacia Kongresa Universitato - la Sanmarina Universitata Sesio (SUS) de la Akademio Internacia de la Sciencoj.

Jam sabate okazis oficiala akcepto ĉe la du Kapitanoj (ŝtatestroj) de San Marino, de la organizantoj de la Itala Kongreso. Dum la solena inaŭguro de la Itala Kongreso, dimanĉe matene, mi salutis nome de Israelo, kadre de la Mezorianta subkontinento (la salutoj estis aranĝitaj laŭ kontinentoj kaj mondpartoj). Mi ankaŭ prezentis la sciencon programon de SUS, kiu unuafoje okazas kiel integra parto de la Itala Kongreso. Simile al la IKU-inaŭguro dum la UK, la inaŭguro de la SUS okazis dimanĉe posttagmeze, kaj tiam oni i.a. disdonis la premiojn Pirlot, por la plej bonaj sciencaj verkoj en la lastaj jaroj. Dum la tuta semajno okazis kadre de SUS kvar kursoj, ĉiu de 3-4 prelegoj, kiuj logis ĉ. kvindek aŭskultantojn. *Astrobiologio: la eblecoj por vivo ekster-tera* (Wandel), *Shakespeare sojle de nova jarcento: Hamleto kaj poste* (Tonkin), *Ĝenerala lingvistiko* (Davide Astori), kaj *Bioenergetiko de la homa organismo* (Eva Bojaĝieva).

## La Distra programo

La partoprenantoj povis partopreni diversajn ekskursojn, kiel al la tri turoj de San Marino - belegaj mezepokaj fortikaĵoj sur la

tri pintoj de Monto Titano, sur kiu estas konstruita la urbo San Marino, al la apuda itala urbo Rimini kaj pli. En la vesperoj estis diversaj artaj kaj muzikaj programoj.

Lunde okazis publika koncerto de JoMo en la parko, kiun partoprenis ankaŭ ne E-istoj. Kiel li faris en Lisbono, JoMo dancigis nin entuziasme.

## Astronomia UK en Vieno

Mia kurso dum la Itala Kongreso okazis nur komence de la semajno, ĉar mi devis prelegi (cetere pri la sama temo kiel en San Marino) en la Ĝenerala Asembleo de la Internacia Astronomia Unio (IAU), kiu okazis en Vieno, samtempe kun la Itala Kongreso. La IAŬ-sembleo estas kvazaŭ la Universala Kongreso de astronomio. Ĝi okazas unu fojon en tri jaroj, ĉiam en alia lando, kaj kunigas milojn da sciencistoj el la tuta mondo. Ĉi foje, inter ĝiaj organizantoj estis ankaŭ Michael Maitzen, profesoro pri astronomio en la universitato en Vieno kaj vicprezidanto de AIS. Maitzen komentis ke la nombro de partoprenantoj en la astronomia kongreso, pli ol tri mil, estis preskaŭ precize la sama kiel en la UK en Vieno en 1992, kiun li organizis. Dum mia restado en Vieno mi vizitis la UN-centron, kiel gasto de Sean O'Raian, vicbasadoro de Irlando en Vieno, kaj la Esperanto-Muzeon, kiel gasto de ĝia direktoro, Bernhard Tuidler.



## El aliaj landoj

*Mikaelo Lineckij*

La 19-21 de oktobro en okcident-ukrainia urbo Lvivo okazis la 24-a Kongreso de Ukraina E-Asocio, en kiu partoprenis membro de ELI-estraro M.Lineckij. Fakte malfacilas nomi tiun kunvenon Kongreso, ĉar praktike neniuj kongreseroj okazis. Mankis ĉies raportoj, primovadaj disputoj ktp. Tamen okazis grava evento:



sur muro de domo №11 ĉe strato, kiu havas nomon de elstara homo Vasil Eroŝenko, estis fiksita memortabulo omaĝe al li. Pri vivo de V.Eroŝenko estas libro, kiu nomiĝas “Homo, vidinta la

mondon”, konsiderante, ke li estis tute blinda. Sur la tabulo en la ukraina, Esperanto kaj la angla estas skribita: “VASIL EROŜENKO (1890 - 1952). La strato estas nomita omaĝe al V.Eroŝenko - renoma ukraina esperantisto, tradukisto, muzikisto, pedagogo, poeto, prozisto-simbolisto, fama per siaj verkoj en la japana kaj Esperanto”.

Planatas en la sekva IE prezenti por la legantoj materialon pri tiu vere mirinda homo.

## MALSTREĈIGA PAĜO



Nu, kial neniuj kredas al mi, ke mi scias ĉion - mi ja vere ĉion scias ĝisfunde! Jes, mi komprenas - malfacilas kredi, ke mi ĉion scias, sed mi ververe absolute ĉion scias!

Memkompreneble krom tio, kion mi ne scias. Kaj da tio “kion” estas terure multe... Nu, nekompareble pli ol tio, kion mi scias.

Se ĝenerale mi ĉion scias!..

### UNULINIAJ VERSAĴOJ

de Maja Ĉetvertova

Aspektas mi tre bone, sed ne ofte.

Edzinas trie mi. La edz' – la lastan.

Valoras multe mi, precipe en vestaĵoj.

Antaŭ edziĝ' li tute ne balbutis ...

Ne, stultas ne laike Vi – Vi stultas virtuoze!

La jaroj kuras for - mi daŭre tridekjaras...

Jen la pilaf': sed viando kaj la rizo mankas.

Mi bonan guston havas. La odoron ankaŭ.

Ho, se ŝatus vi min kiel la bieron!..

La amo pasis - restis ĉio flankaa...

### KELKAJ SPRITAĴOJ PRI VIRINOJ

Ĉiu virino mem rajtas decidi kiomjara ŝi estas.

Virinoj parolas pri amo, sed eĉ ne la vorton pri la amorantoj.

Viroj -male.

Virinoj estas la plej teneraj, plej karesemaj, plej bonaj kreitaĵoj en la mondo, precipe kiam ili ĉion tre volas...

Viroj trompas virinojn pli ofte. Virinoj trompas pli kvalite...

Virino ĉiam scias kion demandi, kiam ŝi ne scias kion respondi...

*Tradukoj de M.Lineckij*

**5-taga verda festo ĉe la Ruĝa Maro**  
**La 20-a Israela Kongreso de Esperanto**  
**en Eilat (Israelo) 11-13.4. 2019, sekvata**  
**de la Kunveno de MONA\* en Akaba (Jordanio)**  
**13– 15.4.2019**

(\*Komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA)



ELI kaj MONA/UEA invitas al komuna evento en 11-15.4.2019  
Israelo kaj Jordanio, en la najbaraj Eilat kaj Akaba ĉe la Ruĝa Maro.

**Ĉeftemo:** “Kunekzisto en la Mezoriento”.

Muzika akompano: **Kajto** kaj **JoMo** **Kotizo:** 300\* eŭroj  
(inkl. 4 noktojn en dulita ĉambro, manĝojn kaj programon)

\* ĝis 31.12.2018 - 285. Nur la Israela Kongreso (3 noktoj 11-14.4) - 240.  
Nur Akaba (14-15.4) 80 eŭroj



**Postkongreso: Jordanio, Israelo** 15-21.4.2019. Kotizo: 550 eŭroj.  
Wadi Rum, Petra, Morta Maro, Jeriko, Masada, Jerusalemo,  
Tel-Aviv-Jafo.

Daŭrigo: Haifa, Akko, Nazareto, Galileo: 22-24.4. 200 eŭr. Informoj kaj  
aliĝo: <http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>



**مؤتمر الشرق الأوسط للإسبرانتو في إيلات والعقبة**